
三帰依

La Tri Rifuĝoj

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

三宝帰依こそは全仏教徒にとって共通のスローガンであり、基礎土台であり、通入門であります。

三宝とは仏と法と僧のことです。この三つを最終的な拠り所とする、と自らの意思を明確にするのが「三帰依」あるいは「三宝帰依」ということです。

(1) 仏 (ブツダ) とは釈尊のことです。法に目覚め法を説かれたお方です。ただし、大乘仏教では、法の象徴としての仏をさまざまに生み出していきました。阿弥陀仏も法の象徴です。

(2) 法 (ダンマ) とは真実・真理のことです。この法は、釈尊に先立って存在するものです。ちょうどニュートンが「発見」した万有引力の法則は、ニュートンとは無関係に宇宙に働く法則であるのと同じです。法は釈尊によって覺られ、説かれ、言葉となり経典になりました。これが教法 (サーサナ) です。

(3) 僧 (サンガ) とは、もともとは「会議」とか「仲間」という意味でした。仏教では四人以上の出家比丘の集まりを「現前サンガ」といい、さらに意味が拡張されて「仏教徒の集まり」を指すようになりました。僧侶個人のことではありません。(僧侶とは、サンガの一員 = 「侶」ということです)

La rifuĝo al la tri gemoj faras la komunan devizon, bazon, kaj eniran pordon por la tuta budhanaro.

La tri gemoj estas budho, darmo, kaj samgo. "La rifuĝo al la tri gemoj" aŭ "la tri rifuĝoj" signifas definitivan intencon finfine dependi de la tri.

(1) Budho signifas Ŝakja-munion. Li estas tiu, kiu vervekiĝis je la darmo kaj ĝin klarigis. En la mahajana budhismo naskiĝis diversaj budhoj kiel simboloj de la darmo. Amitabho estas unu el ili.

(2) Darmo signifas veron. La darmo ekzistas antaŭ Ŝakja-munio. Tio estas same kiel la leĝo pri universala gravito eltrovita de Newton funkcias en la kosmo sendepende de Newton. La darmo, trovita kaj predikita de Ŝakja-munio, fariĝis aro de sanktaj frazoj; jen ĝi estas sasanao.

(3) Samgo origine signifis "komunumon" aŭ "kolegojn". En budhismo oni nomis "aktuala samgo" la grupon el pli ol tri bikŝuoj. Kaj poste samgo pligrandigis sian signifon al "aro de budhanoj". Ĝi ne signifas bonzon kiel individuon.

帰依ということは、私たちの生活にとって、たいへん重い意味を持ちます。言葉の上で三帰依を誓うことは難しいことではありません。（もともと、まずは少なくとも言葉の上であっても、それを誓うことは必要ですが）

私たちが常に己に問うべきは、私たちがふだん何を拠り所として生活しているか、ということです。「あなたがいちばん大切にしていること（もの）は何ですか?」このように問われた時、ためらいなく仏・法・僧であると答えられるでしょうか。皆様方はいかがでしょうか分かりませんが、私は即座にイエスと答えるのにためらいます。正直いえば、私はふだん、財産であったり評判であったりを大切にしているのです。理想と現実のギャップということもできるでしょうが、「現実はそのものさ」と開き直すことは許されないように思います。

私にとって三帰依とは、絶えざる自己批判に他なりません。ともすれば、自分が偉い人間であるように思いたがるのです。「仏に帰依し奉る 法に帰依し奉る 僧に帰依し奉る」と"信仰告白"することは、自らを仏法僧に意識的に従属させることです。

さらにいえば、仏法僧以外には帰依しない、ということでもあります。仏法僧以外のこと（もの）に精神的に縛られない、これによってはじめて精神の自由が得られ、諸々の執着心から解放されていくのだと思います。

La rifuĝo havas tre gravan signifon por nia vivo. Estas ne malfacile ĵuri per buŝo la tri rifuĝojn, kvankam necesas unue ĵuri ilin almenaŭ per buŝo.

Ni devas ĉiam ripete nin demandi, sur kiu bazo ni staras en nia ĉiutaga vivo. "Kio estas la plej kara al vi?" Tiel demandite, ĉu oni povas senhezite respondi, ke la plej kara estas budho, darmo, kaj samgo? Kiel vi karaj legantoj respondas, mi ne scias; mi mem hezitas respondi, "jes". Honeste dirite, al mi kara estas plej ofte havaĵo, aŭ reputacio. Tion oni povus nomi breĉo inter idealo kaj realo. Mi pensas tamen, ke estas ne permeseble sin pravigi preteksti, "Jen tiel estas la realo."

Por mi, la tri rifuĝoj estas nenio alia ol senĉesa memkritiko. Mi inklinas konsideri min kiel eminentulon. "Mi rifuĝas al budho; mi rifuĝas al darmo; mi rifuĝas al samgo." Tiel konfesante oni konscie submetas sin al budho, darmo, kaj samgo.

Se plu diri, la tri rifuĝoj signifas rifuĝon al nenio krom la tri. Spirite kateniĝante de nenio krom budho, darmo, kaj samgo, oni por la unua fojo akiras spiritan liberecon kaj malligas sin de diversaj alteniĝoj.